***Division 52 marked its 25th anniversary in 2022.***
***Sekcio 52 markis sian 25-an datrevenon en la jaro 2022***

## APA Division of International Psychology: A Brief Overview **

by Humphrey Tonkin, USA, tonkin@hartford.edu

### Sekcio de APA pri Internacia Psikologio: Mallonga Superrigardo



La 21-an de februaro 1997, la gvidantoj de Amerika Psikologia Asocio aprobis novan **Sekcion 52,** "Internacia Psikologio," post multaj jaroj da planado. Ĝia celo estas "progresigi la evoluon kaj antaŭenigon de internaciaj rilatoj inter psikologoj sur la tereno de sciointerŝanĝo, stimulado de vizitoj, antaŭenigo de interkultura esplorado kaj evoluigo en klinika aplikado, kaj progresigo de la ĝeneralaj celoj de APA."

Dum siaj unuaj 25 jaroj, Sekcio 52 montriĝis nekutime aktiva sekcio ene de APA, laŭ diversaj manieroj.
(1) Ĝi publikigas elstaran bultenon, *International Psychology Bulletin* (Internacia Psikologia Bulteno), enhavantan originalajn artikolojn pri psikologio tra la mondo verkitajn de elstaraj psikologoj, kaj ankaŭ de studentoj kaj aliaj personoj. Sekcio 52 ankaŭ lanĉis revuon en 2011, *International Perspectives in Psychology: Research, Practice, & Consultation* (Internaciaj Perspektivoj en Psikologio: Esploroj, Praktikoj kaj Konsultado).
(2) Ĝi kreis listservon kaj retejon, nun ĉe www.div52.net , kun ĝisdataj novaĵoj por membroj.
(3) Ĝi proponas stimulan programon en la konferenco de APA ĉiun aŭguston, kie membroj kaj aliaj personoj povas prezenti sian laboron. Ĝia unua tia programo en 1998 proponis 120 referantojn el 39 nacioj. (4) Ĝi akceptas proponojn por siaj ĉiujaraj premioj por elstara agado: internacia psikologo, mentoro, studentaj esploroj, esploroj pri virinoj/genro, elstara libro, frukariera psikologo.
(5) Ĝi proponas al siaj membroj aktivan engaĝiĝon en gravaj projektoj, novan internacian libroserion ĉe la eldonejo IAP, reton de parolantoj, kaj rabatojn ĉe libroj kaj aliaj produktoj.

Dekomence, Sekcio 52 ĝuis aktivan subtenon de gvidantoj de APA, inkluzive de la Ĉefdirektoro Raymond D. Fowler. Kvar el la unuaj 12 prezidantoj de Sekcio 52 estis prezidantoj de la tuta APA, nome: Florence Denmark, Frank Farley, Charles Spielberger, Norman Abeles. La Sekcio ebligas psikologojn kaj studentojn el Usono kaj la tuta mondo aliĝi al la Internacia Sekcio kaj ekaktivi, kontraŭ malgranda jarkotizo.

En 2022, Sekcio 52 festis sian 25-an jaron de alporto de internacia perspektivo al psikologia teorio, esplorado, edukado kaj aplikado. Detaloj troveblas ĉe ĝia retejo www.div52.net

Hodiaŭ Sekcio 52 elstaras kiel unu el minimume kvin internaciaj organizoj, ĉiu el kiu havas sian unikan celaron:

2. IAAP (fondita en 1920) estas la Internacia Asocio de Aplika Psikologio. Nuntempe ĝi havas 2000 membrojn tutmonde, proponas kvaronjaran revuon (*Applied Psychology: An*

*International Review* – Aplika Psikologio: Internacia Revuo), kaj kongreson ĉiun kvaran jaron. (www.iaapsy.org).

3. ICP (1941) estas la Internacia Konsilio de Psikologoj. Ĝi nuntempe havas pli ol 100 membrojn tutmonde, proponas kvaronjaran bultenon (*International Psychologist* – Internacia Psikologo), kaj jarkonferencon. (https://icpweb.org/ ).

4. IACCP (1972) estas la Internacia Asocio de Transkultura Psikologio. Ĝi nuntempe havas 800 membrojn, proponas dumonatan *Journal of Cross-Cultural Psychology* (Revuo de Transkultura Psikologio) kaj kunvenon ĉiun duan jaron. (www.iaccp.org).

5. IUPsyS (1951) estas la Internacia Unio de Psikologiaj Sciencoj. Ĝi estas unio de 75 membraj nacioj (sen individuaj membroj), publikigas *International Journal of Psychology* (Internacia Revuo de Psikologio) kaj gastigas Internacian Kongreson de Psikologio ĉiun kvaran jaron. (www.iupsys.org).